



Voĉdonilo 2010

Estimata membro,

Ni kore invitas vin al nia **Ĝenerala Asembleo** okazonta en Kaiserslautern,
Dimanĉe 23an de majo 2010 matene

- 1 – Legu en la ĉi-postaj paĝoj la agadraporton oktobro 2008 - septembro 2009
- 2 – Legu la financan raporton laŭ la sama periodo
- 3 – Legu la sinprezenton de la 10 kandidatoj por renovigo de duono (+2 postenoj) de la Komitato.

Leginte la kandidatajn sinprezentojn, vi forstreu en la voĉdonilo kandidatiĝo(j)n aŭ ne, laŭ via deziro. Sciante, ke « Chaque membre délégué doit être élu par la majorité des suffrages exprimés (vote par correspondance) (...) » (Règlement intérieur 4.1.2.) Resendu la voĉdonilon en la kovertoj kiujn vi ricevis. Metu la **voĉdonilon** post kompletigo en la **sensignan koverton** kaj fermu ĝin. Poste, **enmetu tiun en la alian**, algluu **poŝtmarkon** kaj sendu ĝin al la sidejo de Esperanto-France, tiel ke ĝi alvenu plej malfrue merkrede **19an de majo 2010** aŭ alportu ĝin al la akceptejo de la kongreso en Kaiserslautern **antaŭ la 20a horo** sabate la 22an de majo.

Kandidatoj :

Guy Camy (1949)

Mia ĉefaj celoj konsistos partopreni:

- en la konstruado kaj disvolvado de la peticio-projekto.
- en la kreado de la Akvitanio federacio.
- en la proponado de strategiaj agadoj.

Raymonde Coquisard (1952)

Mi eklernis Esperanton en decembro 1972 kaj membriĝis al UFE en 1973. Mi vizitis universalajn kongresojn de 1974 ĝis 1999 krom 2. Mi fariĝis estraranino de JEFO kaj de UFE kaj poste ĝia ĝenerala sekretariino en la jaroj 90. Post paŭzo de kelkaj jaroj, mi decidis denove kandidatiĝi al la komitato de Esperanto France cele helpi, konsili, se necesas komuniki pri esperanto al la ekstera publiko aŭ ĉie kie mia modesta helpo estos bezonata.

Emmanuel Debanne (1977)

Esperanto-France devas daŭre firmigi la bazon de la movado (per kursoj, helpo al la lokaj asocioj, rilato kun amaskomunikiloj...) kaj helpi ĉiujn iniciatojn kiuj celas diskonigi Esperanton. Dum la lastaj jaroj, mi precipe agadis en Francilio kadre de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto per organizado de manifestacioj, disdono de flugfolioj au partopreno en konferencoj. La kreskanta investado en la sola angla lingvo, la rezigno pri la lingva diverseco kaj la daŭra bezono de pli bona komunikado en Eŭropo instigas nin pli bone informi pri nia lingva alternativo.

.../...

Bonvolu respondi la 3 demandojn, distranĉi ĉi-tiun parton, kaj sendi ĝin en la ĉi-kunaj kovertoj

- 1 - Mi aprobas la **agadraporton** de UFE oktobro 2008 - septembro 2009 : jes ne sindeteno
(nedevice : se NE, kial ?)
- 2 - Mi aprobas la **financan** raporton de UFE oktobro 2008 - septembro 2009 : jes ne sindeteno
(nedevice : se NE, kial ?)
- 3 - Renovigo de duono (+ 2 postenoj) de la **komitato**. Eblas al mi forstreki nomo(j)n - aŭ ne - se mi deziras :

Guy CAMY
Raymonde COQUISART
Emmanuel DEBANNE

Nicolas GAUFILLET
Julia HEDOUX
Didier JANOT
Anne JAUSIONS

Jean LAZERT
Claude NOURMONT
Jacques VUYET

Nicolas Gaufillet (1982)

Mi esperantistiĝis de 6 jaroj, en Francilio, mi prezidis la lokan asocion "GAE95", dum unu jaro (eble du, mi ne plu memoras) kaj en tiu asocio mi gvidis kursojn, kiel ĉe UFE. Mi sukcesis pri la kapableco pasintjare. Kiel multaj -sed estus tro longe priskribi kiel mi laŭeble helpas, agadas, partoprenas la movadon, la Esperanto-aranĝojn (korekti bultenojn, vojaĝi per la Pasporta Servo, korekti ikursajn lernantojn, deĵori budojn, ...). Mi ĉiam membriĝis ĉe UEA, UFE, SAT kaj SAT-amikaro.

Kial tiu peto ĉe UFE ? Ĉar kiel junulo mi ĉefe konis la membrojn de JEFO, kaj mi estas iom fora de ia idearo, mi ne vere ismemas... Mia celo estas ebligi al ĉiuj, kiuj petas, lerni kaj uzi esperanton kaj disvastigi por la aliaj informoj ; la cetero (kredo, espero, lukto, idearo...) kun la lingvo sekvus, laŭ la homoj. Nun mi ĉefe okupiĝas pri "la bona lingvo", vidu : <http://www.bonalingvo.org/index.php/%C4%88efpa%C4%9Do>

Nun mi estas en Tuluzo, kaj mi volonte helpos vin, se vi akceptas.

Julia Hédoux (1981)

Mi estas 29 jaraĝa kaj reprezentis JEFO-n en la komitato de UFE de 2 jaroj. Mi eklernis Esperanton en 1992 kaj jam partoprenis multajn internaciajn renkontiĝojn. Mi estis komitatano de JEFO (kasistino dum 4 jaroj), de UFE (kasistino dum unu jaro) kaj de TEJO. SED mi NE volas denove iĝi kasistino de UFE. Mi ŝatus redakti proceduron por funkciigi Arturon (datumbazo de la sidejo) kaj esperas ke mi havos tempon por fari tion. Mi jam organizis plurajn internaciajn renkontiĝojn kaj povas helpi en tiu kampo kiun mi ŝategas (rilatoj kun partoprenantoj).

Didier Janot (1957)

Mi malkovris Esperanton en 2004 kaj mi interesiĝis al disvastigo de la lingvo ekde 2005. Miaj precipaj celoj estas :

- organizi komunikajn agadojn al publiko, por plibonigi la konatecon de Esperanto kaj pligrandigi la nombron de esperantoparolantoj de ĉiujniveloj ;
- disvolvi interesaciajn projektojn por Esperanto kaj por justeco en internacia komunikado ;
- kuraĝigi la partoprenon de ĉiuj al agadoj kaj projektoj de Esperanto-France.

Anne Jausions (1947)

Mi naskiĝis fine de 1947 kaj emeritiĝis de mallongtempe. Jam de tri jaroj mi estas unu el la sep reprezentantoj de Esperanto-France ene de FEI (Franca Esperanto-Instituto, kiu interalie organizas la naciajn Esperanto-ekzamenojn: tio estas temporaba laboro pri kiu mi respondecas). Mi konsentas daŭrigi tiun gravan laboron kaj kandidatiĝas por esti membro de la komitato de Esperanto-France.

Jean Lazert (1970)

Esperantiĝis en 1998 kaj loĝas en Parizo. Por UFE, mi estis kurs-gvidanto, sekretario de asocio, redaktanto de la Francilia bulteno, informatika eniganto. Mi estis elektita antaŭ du jaroj sen vera rolo difinita. Nun, de Decembro pasinta, mi estas biblioteka prizorganto, kaj mi pli kaj pli konscias pri la trezoroj dormantaj en la Cerizeja kelo. Kun Régis Fournier (kiu verkis artikolon en LME pri tio), mi do deziras antaŭenigi tiun taskon, konigi tiujn trezorojn al ĉiuj per ordigado de la libroj kaj dokumentoj, prinitado de ties titoloj en komputilo kaj disvastigo interreta de tiu listo.

Claude Nourmont (1945)

Naskiĝis en 1945, esperantisto ekde 1964, kaj aktivas ekde tiam. Post agado ĉe studentaj kaj junulaj rondoj, multajn jarojn ĝenerala sekretario aŭ prezidanto de UFE. Honora Prezidanto de TEJO. Ekde 2003 redaktoro de Le Monde de l'Espéranto. Ekde 2004 Vicprezidanto de UEA, estrarano pri kulturo, edukado kaj kongresoj. Lastatempe zorgis i.a. pri organizo de la ceremonio de la 15a de decembro 2008 ĉe Unesko en Parizo kaj pri preparoj de la kongresoj en Troyes kaj Kaiserslautern.

Jacques Vuyet (1944)

Esperanto estas genia ideo kreita por plibonigi la homajn rilatojn. Estas samtempe praktika kaj filozofia koncepto, kiu povas havi nur profitdonajn konsekvencojn por la homaro. Nun emerita, sed ankoraŭ gardante potencon por agi kaj entuziasmi, mi deziras eniri en la komitato de Espéranto-France por kontribui al disvastigo kaj diskonigo de Esperanto pere de konkretaj agadoj.



varme dankas vin pro via partopreno en la demokratia vivo de la asocio.